

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 44 (124)

MELBOURNE

Jan. - Feb., 1965

FIRST REPORT ABOUT THE 15th CONGRESS

The 15th Australian Esperanto Congress will take place in the National Capital, Canberra, from Sunday, 2nd of January to Saturday, 8th of January, 1966. The Methodist National Centre in the southside suburb of Forrest will provide excellent facilities, including concert hall, conference rooms and catering services. A number of hotels and motels are near the centre for private bookings, but it is hoped to make Brassey House, a first-class government hotel, within easy strolling distance of the Congress hall, the official hotel. Full board is only obtainable at £3.20 per day, but if a complete week is booked the rate is only £15.10.0. Group booking will not be confirmed until June. This New Year, Canberra has been fully booked out, so if anyone is definite about coming and wants private bookings, then it is not too early to do so! Fuller details will appear in the next issue, but early birds may write direct to Canberra Tourist Bureau or to Dr. R. G. Robbins, 4 Wild Street, Manuka, A.C.T.

Club secretaries may expect a set of slides, typescript and tourist and Congress information circulated to their club later this year. Meantime a local Congress committee will be formed and welcomes any suggestions. All Congress fees, registrations and accommodation deposits will be payable to AEA HQ., Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne, who will handle enrolments.

Congress Fees are: Before 1 August, 1965—For A.E.A. members, 30/-; for

others 35/-. After 1 August, 1965: For A.E.A. members 35/-; for others £2. (Please include £2 hotel deposit.)

ESPERANTISTA KULTURO

"Jam venis la tempo kiam ni povas emfazi la ĝuadon de nia lingvo. La kongresoj estu ne nur okazoj por samideana kunlaboro sed eĉ pli okazoj kiam ni povas gustumi la plej dezirindajn oferaĵojn de Esperantujo.

Lingvo servas ne nur kiel ilo por komuniki; ĝi estas ankaŭ arta medio. Poezio, dramo, oratorajoj: jen gravaj artformoj kiuj povas provizi por ni altŝatindajn plezurojn.

Mi do petas ke vi, kongresantoj, ne forgesu ke estos teatraĵa vespero kiam ni bezonas altkvalitajn drametojn k.t.p. Ĉu vi povas fari almenaŭ malgrandan kontribuon? Ĉu via klubo povos prezenti gravan teatraĵon? Ne necesas ke vi lernu ĝin parkere; bona legado ofte tre sukcesas. Pensu kiel vi povos helpi por certigi ke kultura parto de nia kongreso estu memorinda sukceso". Tiuj estas atentindaj vortoj de D-ro C. J. Adcock, NZEA prez. en la "N.Z. E-isto", Oktobro '64. Pro ilia trafa apliko al nia 15a Kongreso ni represas ilin. Anoncu vian kontribuon al la loka Kongresa Komitato. Skribu al D-ro R. Robbins, 4 Wild St., Manuka, A.C.T., eĉ se vi havas nur proponojn.)

LINIO MANKAS!

P. 52, unua kol., sub "Aprezi", metu post la vorto "vorto" en la lasta paragrafo la vortojn:—ĉar leĝantoj kaj tradukantoj devas

RALPH HARRY—AMBASADORO EN BELGUJO

La 4-an de Jan., 1965, la radio kaj la gazetaro anoncis ke nia estimata eksprezidanto, S-ano Ralph L. Harry, estas nomita Australia Ambasadoro en Bruselo. Samtempe li ankau reprezentas Australion ĉe la "Europa Ekonomia Komunumo", la "Eŭropa Atom-Energia Komunumo" kaj la Eŭropa Karba kaj Stala Komunumo".

Gratulon al li!!

Sendube li daŭrigos sian bonan laboron por Esperanto en tiu nova medio.

GROUP AIR-TRIP TO TOKYO

If you wish to avail yourself of the reduced Air-Fare to Tokyo of £312-10-0 (with stopovers in Singapore, Bangkok, Hong Kong and Manila), send your 10% deposit immediately to the U.E.A. Chief-Delegate, Ken G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, S.E.8.

SYDNEY.—Learners are invited to participate in a new beginner's Esperanto course commencing Monday, 8th Feb., at Esperanto House, 143 Lawson St., Redfern, at 6 p.m. Information telephone 661-1990.

ESPERANTO GAZETTES

Are you interested in Japanese life and outlook, language and mores? Read "Oomoto Internacia". 12/- yearly.

In Protestant evangelical thought and activity? There's "Dia Regno", 36 steloj.

In Roman Catholic orientation on affairs? Turn to "Espero Katolika", 28 steloj, or to "Nova Civito", with articles on ancient tradition and modern confrontation, 29 steloj.

In speculative leftism and socio-economic studies, read "Sennaciulo", 30 steloj, and "Sennacieca Revuo", an annual, 9 steloj.

Addresses of these and others are on p. 163 of "Jarlibro" (U.E.A.) 1964.

"OOMOTO" AGENCY

F. R. Banham, your editor, is agent for this paper. Please send subscriptions to his address.

NEKROLOGO

Mortis en Decembro 1964, **William James Drummond**, fidela sekvanto de Ludoviko Zamenhof. Li estis unu el la plej fidelaj laborantoj por la Esperanto-Movado kaj centoj da Esperantistoj memoras lin kiel gajan, bonkoran, amindan amikon.

Mi estis deksepjara kiam mi timplene faris la unuan viziton al la Melburna Esperanto-Societo kaj, inter tiuj kiuj donis al mi varman mansaluton, estis Vilĉjo Drummond. Inter la aliaj ĉeestantoj troviĝis S-ino Drummond (kiu unue renkontis sian estontan edzon ĉe Esperanto-kunveno) J. G. Pyke, Maurice Hyde, F-ino Sinnotte, kaj aliaj kies nomoj estos por ĉiam ligitaj kun la Esperanto-Movado en Aŭstralio.

La jaro estis 1915, jam furiozis la unua mond-milito kaj pacaj sentoj estis preskaŭ plene elversitaj el la homa menso. La Esperanto-Movado ankoraŭ estis junaĝa. Malmultaj sentis la valoron de internacia lingvo, nek sin interesis pri la idealo al kiu Esperanto estas ligita. En ĉiuj landoj estis grupetoj kiuj, malgraŭ la malfavora atmosfero, ne perdis esperon pri la taŭgeco de la lingvo kaj pri la fina venko de la idealo. W.J.D. estis dediĉita ano de la Melburna grupeto. Ĉiam li estis entuziasma ĉe Esperantistaj kunvenoj kaj, ekstere, preta servi la pli vastan homaran movadon en diversaj organizaĵoj, religiaj, politikaj, sociaj.

Vilĉjo Drummond spertis la renaskiĝon de la internacia sento post la fino de la Mond-Milito. Eĉ pli entuziasme li laboris ĉe kunvenoj. Precipe li estis preta instrui kaj kuraĝigi novlernantojn. En postaj jaroj, personoj kiuj lernis Esperanton en tiu periodo nepre laŭdis la bonkorecon de W.J.D.

En 1923, Gesroj Drummond ĉeestis la Internacian Esperanto-Kongreson ĉe Nuremberg, unu el la plej gravaj post-militaj kongresoj. Post hejmvreveno, Vilĉjo denove prenis sian lokon en la movado kaj la disvastigo de Esperanto en Viktorio ŝuldas multon al lia alilanda sperto.

Esperanto, dum la vivo de W.J.D., progresis, haltis, kaj denove progresis. Li kredis ke ĝi ne fine florus kon-

stante ĝis la homaro estos preta vivi pace. Li neniam perdis la esperon ke, finfine, paco ja regos, kaj al tiu celo li dediĉis la vivon.

William James Drummond estis sperta, gaja, aminda samideano kaj li ĉiam restos en la memoroj de tiuj kiuj konis lin. Li dediĉis sin al bela idealo kaj li neniam laciĝis.

—Roy Rawson.

PIONIRO FORLISIS NIN

La nestoro de la aŭstralia Esperanto-movado, nia kara amiko W. J. Drummond, forlasis nin por ĉiam la 10-an de Decembro, 1964, preskaŭ 83 jaraĝa.

Post subita apopleksio la 3-an de Dec., li restis komata en hospitalo kaj pace mortis unu semajnon poste.

S-ano W. J. Drummond estis vera E-pioniro. La Melburna E-Klubo fondiĝis en la jaro 1905 kaj jam 2 jarojn poste S-ano Drummond aliĝis al ĝi. Li partoprenis la unuan aŭstralian E-kongreson en Adelaide en 1911, pri kiu li ofte kaj fiere rakontis al ni pli junaj Esperantistoj. Li estis dum multaj jaroj Sekretario, Vic-Prezidanto kaj Prezidanto de la loka klubo. Lia grandanima koro ĉiam kaj ĉie batis por Esperanto. Li regule vizitis la kunvenojn de la klubo, instruis multajn lernantojn kaj vaste propagandis nian lingvon.

Kiam fondiĝis la Melburna E-Kooperativo li fariĝis tuj unu el la plej entuziasmaj anoj, ne nur per vortoj, sed per aktiva agado kaj ofertemo. Ĝis sia morto li estis unu el la kvin Direktoroj de la Kooperativo.

Estis honoro senti sin amiko de tiu varmkora homo, kies sindediĉo al Esperanto certigas al li daŭran lokon en nia memoro kaj en la historio de nia movado.—Herbert Koppel.

PRI LINGVA ĜUSTECO

Cito el Kongresa Rezolucio (“Esperanto”, p. 154):—

“La 49-a Universala Kongreso de Esperanto, konsistanta el 2512 reprezentantoj de 43 landoj. . . .” Kun “Sennaciulo” (11/64) ni dubas pri la saĝo tiavorte tamburi kaj havas senton, ke “la plej multaj kongresanoj reprezentis nur sin mem”. Pluraj gazetoj reprenis la citon senkomente, senatente.

Australia Kroniko

SYDNEY: La Sidneja societo okazigis 21/11 oportunvendon, kiu enspesis £33/11/- por Aŭstralia ĉambro ĉe U.E.A.-domo. Ni dankas aparte la Ges. Matasin, S-inon Feldmayr, kaj Sinon Morrison pro iliaj sindone-maj laboroj, ankaŭ la membrojn de la Manly kaj Hornsby kluboj por iliaj subtenoj.

Tre gratulinda estas la progreso de la F-ino Meade, S-ro Hill, Ges. kaj F-ino Price; gesstudantoj de S-ro Dunn kaj S-ro Davidson. La gestudentoj donis al ni interesajn paroladetojn 7/12. 14/12 S-ro Springer starigis viglan diskuton pri rimedoj plibonigi la homaron. 19/12 ni festis Zamenhofan tagon. Ĝi estis ĝojplena vespero en kiu oni diskutis la venontan kongreson en Japanujo kaj gaje kantis laŭ la muziko de F-ino Dennis kaj ŝia ukelelo. Ni esperas ke la nova hidrofojla boato inter Manly kaj Sidnejo ebligos al ni pli ofte la komponion de la Manlianoj. 21/12 S-ro Dunn nin distris per tradukoj de moderna Indonezia literaturo.

Februara programo: 1-a, Jarkunveno; 8-a, “Zorgoj de Abelportisto”, W. Chandler; 15-a, “Mondo, Kien vi Iras?”, W. Gueltling; 22-a, “Songarto”, F. Dunn.

En la nova telefonlibro sub “Esperanto Information Service” aperos la numero de S-ro T. Elliott, 661-1990. Ni petas ke oni sendu detalojn de Esperantaj aferoj al S-ro Elliott por efektiviĝi tiun servon.—T. Elliott.

MANLY: Tre ĝinda Zamenhof-Festo okazis dimanĉe, la 13-an de Lec. en la hejmo de Ges-roj J. D. MacGillivray. Post alveno, ĉiu membro devis registri Kristnaskajn salutetojn en Esperanto sur sonbendon kaj tiuj registritaj salutetoj poste estis disaŭdigataj al la ĉeestantoj. La festparoladon faris S-ano Kevin Smith, kiu skizis la verkon kaj idealojn de la Majstro. La Prezidanto, S-ino M. Duncan, raportis pri sia instruado de Esperanto en 3 lokaj alternejoj kaj pri la granda subteno kaj aprobo kiun ŝi ricevis de la estroj de tiuj lernejoj. Specialan dankon ankaŭ meritas la loka taggazeto “Manly

Daily", kiu ĉiusemajne publikigas gravajn novaĵojn pri nia lingvo en speciala "Esperanto-Angulo".

Ni finis sukcesan kunvenon per muzikaj prezentadoj kaj kantoj kaj ĝinda manĝeto.

Membroj de nia societo aktive kunhelpis en la granda kolekto-kampanjo por la "Foundation for Aboriginal Affairs Door-Knock Appeal". Entute ni sukcesis kolekti £163 en la Eastern Hill distrikto. Kelkaj knabinoj el la Mackellar Altlernejo meritas nian dankon pro aktiva helpo. En sia komentario pri la kolekto, la "Manly Daily" diris ke per tiu agado la Esperantistoj praktikis aktive unu el la celoj de la E-movado, nome la "plibonigo de la rilatoj inter homoj de diversaj haŭtkoloroj, rasoj kaj kredoj".

La Urba Konsilantaro de Manly donacis £5 al nia klubo kiel duonpago por tutpaĝa reklamo pri Manly en la U.E.A. Jarlibro 1965.—M. Duncan.

MELBOURNE: Ni denove havis la plezuron bonvenigi inter ni F-inon Rita van Rijswijk, kiu revenis el Nederlando kaj ekloĝis en nia urbo. Si estris (16/11) "Forumon", specon de diskut-vespero pri interesaj aferoj. S-ro H. M. Cohen (23/11), klarigis la signifojn de multaj indiĝenaj nomoj. F-ino Amy Godfrey (30/11), montris lumbildojn pri sia lastjara vojaĝo tra Eŭropo kaj (7/12). S-ino Fay Koppel parolis pri "la E-prozistoj de la 2-a literatura periodo". En la novembro kunveno de la RENDEVUO, S-ro Herbert Koppel prelegis kun lumbildoj pri KANADO, lando en kiu li vivis de 1940 ĝis 1948. Image ni vojaĝis en luksaj vagonaroj de la Atlantiko al la Pacifiko kaj survoje vizitis famajn lokojn kiel Quebec, Montreal, Toronto, Niagara Falls, Ottawa, Winnipeg, la Banff Nacian Parkon kaj Vancouver.

La Zamenhof-Festo okazis ĉi-jare jam je la 5-a de Dec., ĉar la Konferenc-Halo de la Asocio de Plenkreskuloj ne estis havebla je alia dato. 62 ges-anoj plenigis la halon kiam la Prezidanto, S-ro E. McKenzie, malfermis interesan vesperon.

Pianludis Kim Bastin, aktorin la re-junuloj Helen Prent, Marguerite Fink, Ivan Heldzingen kaj Danny Kane, popolkantojn prezentis Joan

Andrews, Humorajn Esperanto-poemojn deklamis Herbert Koppel kaj la tuta anaro komune kantis. Kiel Kulmino de la vespero, Pastro C. Cowling, kiu nun loĝas en Melburno, faris interesegan festparoladon pri "Zamenhof kaj la Reĝa Lingvo". Resumon de la agado en 1964 (fare de S-ino F. Koppel) sekvis prezentado de donacoj al la instruistoj, dankesprime de la klasanoj.

Almenaŭ 40 personoj ĉeestis 2-an "intiman" Zamenhof-Feston, kiu okazis (14/12) en la Esperanto-Domo. La unua parto de la vespero estis tute dediĉita al D-ro Zamenhof. Danny Kane parolis anglalingve (por la komencantoj) pri la vivo kaj verko de Zamenhof, F-ino Prent, Ges-ro Koppel kaj Ivan Heldzingen legis el la verkoj de la Majstro. En la dua parto S-ro P. Schwerin (Sydney) prelegis kun diapozitivaj pri la ĉirkaŭaĵo de Sidnejo kaj pri Konkoj.

PERTH: Por nia klubo 1964 estis vere memorinda jaro. Ne nur la klubkunvenoj plivigliĝis pro ĉiam kreskanta ĉeestantaro kaj la kursoj pliprosperis, sed venis al nia urbo nombro da tre interesaj vizitantoj.

Unue venis Ges. Aargaard, Novzelandanoj, survoje al la hejmlando post kelkmonata restado en Eŭropo, kiu inkluzivis ĉeeston ĉe la mondkongreso en Sofio kaj viziton al Kastelo Gresillon.

F-ino Rita Van Rijswijk, revenante al Melburno post restado en Eŭropo, pasigis kelkajn tagojn ĉe ni kaj eĉ en tiu mallonga tempo kvazaŭ fariĝis ano de nia esperantista familio.

En tempo kiam ni vane serĉis instruiston por nova kurso, tute hazarde venis al ni la ĉiam bonhumora, ĉiam servopreta mondvojaĝanto, S-ro W. L. Simpkins, kiu tuj sin proponis por tiu tasko, kiun li plenumis kun granda sukceso ĝis bedaŭrinde je la jarfino niaj Melburnaj samideanoj forlogis lin de ni! Tamen, dankon Sinjoro, pro via bona laboro!

Fine, survoje hejmen post partopreno en la mondkongreso ĉe Hago, Ges. E. Hearne haltis en Perth dum kelkaj tagoj. Ni renkontis ilin vespere de la 21/12 ĉe societa vespero en la bela hejmo de D-ro kaj S-ino Einhovici kun kiuj ili konatiĝis en

Hago. S-ro Hearne rakontis al ni kelkajn interesajn spertojn el la jus finiĝinta eksterlanda vojaĝo kaj aŭdigis al ni du tre interesajn diskojn, unu pri perfekta prononcado, la alia la salutoj al la kongreso fare de la delegitoj de la diversaj nacioj, inter kiuj ni aŭdis la voĉon de S-ro Hearne mem, kiel oficiala reprezentanto de Aŭstralio. Jen taŭga kulmino al vere kuragiĝa jaro.

La kafejo "El Calib" estis la scenejo de nia komuna manĝo por festi la datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, 15/12. Ĉeestis 22 personoj.

Post la festmanĝo oni translokiĝis al la ĉambrego de Women's Service Guild, kie okazis la Zamenhofa Festo.

Post kelkaj enkondukaj vortoj de la Vic-prezidanto, F-ino O. Stempel, venis la prezidanta alparolo de S-ro C. Dean. Aliaj parolantoj estis S-ro W. L. Simpkins, kiu verve rakontis pri sia 14 jara vagado tra 41 landoj, kaj D-ro A. Einihovici, kiu priskribis siajn spertojn ĉe la kongreso en Hago, kaj substrekis la idean enhavon de la movado.

Ni ŝuldas varman dankon al S-ino Calladine, kiu kantis, S-ro David Phillips, kiu ludis violonon, S-ino Phillips, kiu akompanis ĉe la fortepiano, kaj laste sed ne lasta F-ino J. Lindsay, kiu deklamis.

Denove nia senlaca S-ino Pollard faris kaj vendis popece belan kukon.

Estis aparte plezure vidi S-inon Sedgley denove inter ni ĉe la Zamenhofa fest-manĝo. Bedaŭrinde tio estis nur mallonga forpermeso de la hospitalo kie ŝi devis resti jam de kelkaj monatoj. Tamen, ŝia sana kaj vigla aspekto esperigis al ni ke frue en la nova jaro ŝi povos adiaŭi al kuracejoj kaj medikamentoj.

La jarkunveno de nia Ligo okazis 3/12. La prezidanto, S-ro J. Hawks, raportis ke dum la lastaj monatoj la kunvenoj estis multe pli bone vizitata ol je la komenco de la jaro. La vizito de S-ro Simpkins iom revivigis la entuziasmon. La kasisto, S-ino G. Pollard, kontentige raportis. La bilanco ĉe la banko estas pli ol £70. La Direktanto de Ekzamenoj informis ke 9 kandidatoj sukcesis en la unuagrada

kaj unu en la duagrada ekzameno de la Ligo.

La jarkotizo restas senŝanĝa, nome por membroj 30/-, asociaj membroj 10/- kaj kursanoj 42/-. Oni elektis tiun novan estraron: Prez.: S-ro C. Dean; Vic-Prez.: F-ino O. Stempel; Sekr.: F-ino A. Longson; Kasisto: S-ino G. Pollard; Bibliotekisto: S-ino O. Malcolm; Ekzamenoj: S-ino R. McGrath; Informado: S-ro J. Hawks; "Nigra Cigno"-redaktoro: S-ino E. Palmer.

Malĝoje ni devas raporti la morton antaŭ nelonge de iama studento de Esperanto, S-ino Daniels, filino de nia fidela, malnova samideano, S-ino B. Jones.—A. Longson - R. McGrath.

ADELAIDE: La jaro 1965 komenĝis multpromese 4/1 per kunveno organizita de F-ino W. Addis kaj S-ino W. Fulton, en la hejmo de S-ino Finlayson en Kensington Park. La okazo estis bonveniga vespero por saluti S-ron W. L. Simpkins, kiu samtage alvenis el Perth.

18 personoj ĉeestis, i.a. Ges-roj M. Leereveld kaj ges-roj H. Koppel el Melburno. La prezidanto, S-ro L. N. M. Newell, bonvenigis la ĉeestantojn kaj lau lia peto S-ro Simpkins rakontis pri siaj vagadoj tra multaj landoj. Fine, la gastigantinoj regaligis nin per luksaj frandaĵoj.

CANBERRA: Dum 1964 kunvenoj okazis regule ĉe la "Friends Meeting House" la klubo festis la Zamenhofan Tagon je la 18-a de Dec. S-ino Joyce Torr faris belan festparoladon pri "Zamenhof, la homo". Dankis ŝin S-ro Ralph Harry, kiu aldonis rakonton pri siaj transmaraj vizitoj. Poste, Ross Robbins prezentis Esperantistan "Kvizon" kaj kelkajn magiaĵojn. Ni finis la feston per speciala vespermanĝo.—R.R.

ROCKHAMPTON: Z a m e n h o f a Festo ĉe la hejmo de S-ro J. Moore en la 16a de Decembro.

S-ro Petley ricevis leteron de Franco, kiu tradukas en la Francan E-an broŝuron pri Rockhampton.

Adult Education: Klasoj komenĝos en Feb. S-ro N. Russell gvidos komencantojn, kaj progresintojn S-ro H. Petley.

Retiring pres., Mr. H. V. Petley, reviewing 1964, reported largest intake of students so far, important translation work and formation of two Esperanto groups in schools. Officers: Pres., N. W. Russell; vice-pres., H. V. Petley; sec., V. B. Moore; treas., J. G. Pinwill; auditor, D. McIntyre; social secs., Mmes. Simpson, Ross, Dunbar; pen-friend agent, Mrs. Ross; librarian, J. B. Moore; committee, Mmes. Bencke, Rayner, Clay, Miss Evans, Miss Ned-drie, Mr. Ross.

The library has 143 Esperanto magazines and 93 books. Membership fee (Society) is 10/- a year.

Ekzakte ĉe la Tropiko Kaprikorna stariĝis grandega Inform-Tabulo por Turistoj sur kiu troviĝas ankaŭ informo pri la kunveno de la Esperanto-Societo kaj la telefon-numero de ĝia prezidanto, S-ro H. V. Petley.

PRI "ADELAIDE"

"The A.E." paĝo 38. Sajnas, ke estis nur la prononca akordo inter **Adelaido** kaj la franca formo, kiu instigis la francajn leksikonistojn proponi la unuan kiel la formon por Esperanto. Se jes, malgraŭ tio, ke la francaj leksikonoj estas multe pli bonaj ol iuj ajn anglaj, la vorto **Adelaido** ne posedas ian esencan meriton, kaj oni rajtas anstataŭe utiligi iun alian formon preferindan. Tia troviĝas **Adelajo**, pro du kialoj:

(a) La prononco de Esperantigita vorto devus akordi kun la prononco de la lingvo originala, pli ol kun tiu de alia lingvo, kiu jam modifis ĝin. **Adelajo**, tial, preferindas, ĉar la vokaloj kaj la nombro da silaboj proksimiĝas al la originala pli bone ol tion faras **Adelaido**.

(b) La Esperanta afikso "ido" troviĝas en la formo **Adelaido**, kaj donas al la vorto komikan aspekton, kiun **Adelajo** evitas.

—Rex Hanney, Sud-Aŭstralio.

PLUMAMIKO

Via lando kaj popolo multe interesas min, kaj mi deziras havi pruvon de la praktikeco de E-o. Tsunetomo Mori, Ten'onkyo, Kameoka-ŝi, Kioto-hu, Japan.

APREZI

Kreinte la neologismon "aprezi" (jam en 1926), mi kuras por defendi mian idon kontraŭ la atako en "The A.E." de decembro 1964.

Mian difinon akceptis K. kaj W. en sia "Parnasa Gvidlibro: "kompetente taksu la artan valoron de io." Ĉi tiu vorto estas necesa en la literatura kritikado, aŭ pli ĝuste, en ĉia artisma kritikado, ĉar neniu alia vorto esprimas la saman ideon.

"Ŝati" komence signifis "alte taksu, rigardu kiel valoran", sed en la uzado ĝi degeneris en la signifon "ricevi plezuron el" (angle: "to like"). Oni notu, ke kiel rezulton la aprezado povas produkti ankaŭ malŝaton.

Difinante "aprezi" per "ŝati", la nova E.-Fr. Vortaro simple eraris. Eĉ Homero. . . .

Rilate al la formo, ĝiatempe mi konsideris "apreci" kiel kandidaton, sed fine preferis "aprezi" ĉar ĝi proksimiĝas al la sono de la angla kaj franca vortoj, kaj al la formo de la itala. Krome, ĝi sonas pli malpeze, flue, ol "apreci". Ĝian eventualan valoron kiel rimo mi tute ne konsideris; cetere, ĝi nur tre malprobable troviĝas en poemo.—L. N. M. Newell.

Lau Butin & Sommer "aprezi" = (1) nach Gebuehr schaeetzen (to value, rate, appraise, estimate the value of); (2) zu wuerdigen wissen (to know how to rate; value, estimate, prize).

Se E-istoj komune uzadus "aprezi" **lau via difino**, jen jam bone. Sed ili ne tion faras, nek povas fari. Preskalku ĉiuj E-istoj ne povas konsulti la Parnasan Gvidlibron. Nur tre malmulte da E-istoj havas ĝin; ĝi estas jam de longe elĉerpita. Multaj Francoj supozinde uzas kaj uzos la E.-Fr. vortaron de Waringhien, kaj simile Germanoj tiun de B. & S.

"Neniu alia vorto esprimas la saman ideon", nome, vian difinon en P. Gv. Sed sendube estas, ke la vorto, kiel nun uzata, havas aŭ povas havi diversajn senĉojn, kiel konfirmas la vortaroj de W. kaj B/S. Via originala kaj ĝusta difino riskas perdiĝi.

La vorto estas akceptinda nur kondiĉe, ke ĝi nepre havu la strikte difinitan senceon atribuitan en la P.Gv.

Kiel nun atingi tiun uzunucon, kontraŭ la influo de tiu bedaŭrinda fuŝo fare de vortaristoj, kiuj ne redonis kaj timinde ne redonos la originalan difinon?

Oni rajtus iom dubi, ke Waringhien difinis ĝin per "ŝati" simple pro Homera dormemo. Pri tio mi kontentiĝus nur per lia propra ekspliko. Stranga afero, ĉar estis ĝuste li kaj Kalocsay, kiuj ame patronis "aprezi" kaj donis al ĝi vivon portempan pere de sia P. Gvidlibro.

Rimarku, ke B/S ellasis el sia difino la grave signifan adverbbon "kompetente". Sen tiu elemento "aprezi" ne havus defendeblan valoron. "Valorfiksi" au simila sufiĉus. T.e. "taksipri mona, arta, karaktera, utileca valoro de io au iu."—Red.

JAPANO PAROLAS PRI ESPERANTO KAJ LINGVOJ

Syuzi Matuda sendis al ni 501-paĝan tradukon de la verko (Kenzyu-Parko Arbaro), kies aŭtoro estis la mortinta E-isto Kenzi Miyazawa. Ĝi estas antaŭpresa kopio. La presita kaj verŝajne reviziita teksto aperos libroforme ĉe la Tokia Kongreso, se ĉio bone marŝos.

Ni redonas kelkajn rimarkojn de la tradaukinto:

"Kvankam Esperanto havas ĉe multaj punktoj komunecon kun ekster-eŭropaj lingvoj, ĝi estas esence Eŭropa lingvo. Ne-Eŭropaj popoloj tre nature renkontas malfacilaĵojn ĉe lernado. La Japana lingvo apartenas al tute alia kategorio ol tiu de la Eŭropaj lingvoj, kaj niaj vivmanieroj kaj sekve pensmanieroj kaj lingvouzadoj estas multe diferencaj. (Pri multaj lingvaj demandoj) ne-Eŭropaj E-istoj devas konscie prizorgadi kaj speciale memori. Krome, unu fojon erare memoritaj vortoj estos inerte uzataj, ĉar ni ne scias la historion de ĉiu vorto.

"Povas esti, ke por ni tiu aŭ alia uzado estas pli racia ĉe ni, sed en la nuna periodo oni devas obei kutimojn de Europaj lingvoj, ĉar la lingvo ne estas senviva kreaĵo. . . .

"Pasis ĉirkaŭ okdek jaroj de kiam nia majstro kreis E-on. Tiu tempodaŭro estas mallonga kompare al la

historio de la homaro. Tamen aliflanke oni povas diri, ke ĝia disvastiĝo estas tre malvigla kaj malrapida malgraŭ, ke nun ĉiuj homoj instruitaj sentas neceson de internacia lingvo.

"Oni povas klasifiki homojn, kiuj lernas lingvojn aliajn ol la sia. Nome, kiam iuj sentas neceson aŭ utilecon de iu lingvo okaze de rekta kontakto kun alilandanoj, ili ekdeziros lerni aliajn lingvojn. En aliaj okazoj multaj homoj ne havantaj tian okazon ankaŭ lernas alilandajn lingvojn. Tia-okaze io igas ilin lerni tiun aŭ alian lingvon. Kio estas tiu io? Nome, ili postulas plezuron de legado, por havi ĝuon, scion, alivorte ion novan kaj freŝan por la kapo kaj koro.

"Nuntempe tre malmultaj homoj eklernas unu lingvon kiam ĝi alportas malmulte da utileco aŭ ĝuo al ili, sed foje okazas, ke homoj deziras lerni ĝin por nobla celo, ekzemple por la bona de l'homaro. Tiajn idealistojn oni nomas E-istoj.

"Ĝis nun en E-o aperis multaj libroj. Ili estas valoraj kaj utilaj en E-ujo, sed ne tiel allogaj por homoj ekster E-ujo (Pardonu miajn arbitrajn vortojn), ĉar multaj el ili estas jam legitaj en naciaj lingvoj. Tio ne estas kulpo de ties fervoraj laborantoj. Sed tio estas rezulto de la fakto, ke la lingvoj en Eŭropo, kie naskiĝis E-o, estas tro bone konataj reciproke. Oni aĉetas E-ajn librojn ĉefe por studi kaj lertiĝi en E-o, kiel rimedon por lerni, sed ne kiel celon por nova intereso.

"Nu, en la mondo sin trovas multaj popoloj, kies kulturo restas fermita por aliaj popoloj pro la lingvaj aŭ literaj muroj. Se la tieaj pordoj estos malfermitaj ili povos liveri multajn novajn interesojn ne nur al E-istoj sed ankaŭ al la ĝenerala publiko de la mondo. . . . Se oni povus havi multajn librojn legindajn en E-o el la Ĉina, Hinda, Araba, Malaja, Mongola kaj Afrikaj popoloj—librojn valorajn pri specialaj kampoj en ĉiuj landoj, ne nur sur la nivelo de E-ujo, sed sur nivelo de la mondpubliko, multaj homoj ekhavis intereson kaj sentus utilecon de E-o. Mia laboro estas unu malgranda provo por tia celo, por progresigi kaj riĉigi nian aferon."

PLI DA ZORGO!

Sur flugfolio dissendita el Usono tra la mondo troviĝas titolo "La Mondo Demandas Pacon". La verbo estas erare uzita en tiu frazo. Legu: postulas. En "British Esperantist", p. 311 (1964): ". . . submetigis al kritika operacio". Legu: tre grava, danĝera, kriza aŭ simila.

Tiaj krientaj eraroj en Esperanta uzado ridindigas nian movadon, ĉar sciantaj kritikantoj tentiĝas demandi: Ĉu vere Esperantistoj povas uzi korekte sian "karan lingvon?" Aŭ, Ĉu vere Esperanto estas lingvo taŭge praktikebla por homoj diverslingvaj, kiuj estas tiel evidente influataj de la gepatra lingvo?

La kulpo kuŝas ne ĉe Esperanto, sed ĉe ĝiaj misuzantoj, el kiuj cetere multaj eraras nur "plume", senzorge, kaj ne pro funda nescio. Tamen estas grava danĝero, ke ilia facilanimeco povas rekte minaci la sorton de nia afero.

Krome, estas aldona risko, en tio, ke, se homo atentigas tiel erarintan Esperantiston pri eraro, tiu tre povas ofendiĝi, aŭ ĉagreniĝi pro sentata propra kulpo, kaj kolemete forĵeti Esperanton. Li sentas embarason kaj panike ne plu volas havi aferon, kiu jam venigis lin en tian kaŝon.

Ankaŭ redaktoroj konsciencie faru sian devon de tekstkontrolo. Verdire, tio estas tasko postulanta intencan priatenton, kaj eĉ la plej aglookulaj povas foje preterlasi eraron aŭ de propra plumo aŭ de aliula. Perfekteco ne estas atingebla, tamen forte dezirinde estas, ke koncernuloj pli klare konsciu pri la graveco de sia laboro.

Homoj preparantaj publikan flugfolion aŭ similan saĝe faras, kontroli-gante siajn tekstojn ĉe vere kompetenta kaj pacience penema Esperantisto antaŭ presigo.

Vidu: The A.E. 5/63, Angulo Grublula, bazita sur plendo de G. Waringhien.

ĈIUJ LITEROJ

troviĝas en la sekvanta frazo:

Sajnas, ke la sagaca monaĥo laŭtvoĉe rifuzadis preĝi sur herbejo.

(British E-ist, Junio 1952.)

ROUND THE WORLD

General Franco was Honorary President of the 24th Spanish Esperanto Congress in Barcelona, where 600 members gathered.

In Brazil, Dr. A. M. Filho, Chancellor of the University of Ceara, has inaugurated an official course of Esperanto with the same status as all other language courses.

In Holland a new law permits voluntary instruction of Esperanto in elementary schools. An official course has been created for teachers wishing to acquire a diploma for instruction in the language.

The Publicity Division of New Zealand has completed a new colored 16mm film with commentary in Esperanto—"La Novzelandanoj".

EDUCATION NOTES

At Liverpool University 9 students offered Esperanto as part of their study for a B.A. degree. Five universities have lectureships in Esperanto, which is taught officially in 11 others and unofficially in 15 more.

The Education Dept. in Tel-Aviv (Israel) by circular to all city schools says it is ready to organise courses in Esperanto for teachers during vacations.

In the Home Economics Dept. of the Helsinki Univ. (Finland) students, to graduate "cum laude", must complete two courses in Esperanto. This summer Cseh led 36 students through the "Fundamental Course", and Setala 24 through the "Economic Course".

(The above pars are condensed from "American Esp. Magazine.")

THE ESPERANTO BIBLE ON TAPE

A Roman Catholic blind institute in Grave (Holland) has a library of Esperanto tape recordings, with "readers" throughout the world. It intends to record the complete Esperanto Bible, using the gift of tape from an American body. Four or five copies will be available for borrowing. A "master tape" will be conserved in the library to restore its other recordings of the volume should they become injured or worn.

("Nederlanda E-isto" 10/64.)